

Respondo al salutvortoj, III.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1984 decembro 27 kaj 29.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-137/Radiokasedo-137-1-858-1985-Claude-kaj-Andree-GACOND-Respondo-al-salutvortoj-III.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Tiun ĉi lastan elsendon de la jaro ni ŝatas dediĉi al la salutado de skribemaj geaŭskultantoj, esprimante al ili, same kiel al ĉiuj, kiuj aŭdas nin, niajn bondezirojn por la nova jaro, ke ĝi estu ĉiurilate signifoplena.

A.- En Vire, Francio, A. Legret pozitive reagis al niaj paroladoj pri Andreo Cseh.

Cl.- El Pollando alvenis interesa letero de Torvid Edvardsen en Szczecin. Jen kelkaj citaĵoj el ĝi:

A.- "Mi ĝis nun apartenis al tiu "silenta aŭskultantaro", kiu neniam skribas al vi. Tamen mi depost pli ol 20 jaroj aŭskultas vin, eĉ en diversaj partoj de la mondo dum miaj vojaĝoj kiel maristo, precipe tiam, kiam viaj disaŭdigoj okazis ankaŭ posttagmeze. Ekde nun, sciante kiom gravas por vi leteroj de la aŭskultantoj, mi intencas sikribi al vi de tempo al tempo. En via programo vi priparolis la esperantistan centron La Chaux-de-Fonds. Mia edzino kaj mi volonte iam vizitos ĝin. Vi menciis, ke eblas veni tien labori dum du periodoj. Mia edzino kaj mi jam ne plu estas junaj, sed tamen kapablaj labori, almenaŭ sub gvidado de majstro mi povus fari ĉarpentistan laboron, pentri kaj simile. Koncerne mian edzinon, ŝi verŝajne nur povus fari purigan kaj kuirejan laborojn. Ni petas vin bonvole informu nin tra viaj kunlaborantoj en La Chaux-de-Fonds, ĉu ankaŭ sekvontjare okazos tie invitoj al laboro? Kaj ĉu ili akceptas pli aĝajn partoprenantojn.... Viaj elsendoj tre plaĉas al mia edzino kaj mi kaj mi ĉiusemajne surbendigas la programon kaj aŭskultas ĝin ĉe la matenmanĝo kun la edzino."

Cl.- Responde ni diru, ke denove okazos restadoj de la bona volo, kies celo estas daŭrigi la konstruon de la gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista. La bonvoluloj laboras tridek horojn en la semajno kaj ricevas esperanto-instruadon, se ili estas krokodiloj aŭ komencantoj kaj partopreneblon en esperanto-staĝoj, se ili estas esperantistoj. Ne estas repagitaj al ili la vojaĝkostoj, sed en La Chaux-de-Fonds mem ili estas agrable gastigataj. Ili do ne havas elspezojn, sed ankaŭ ne ricevas salajron. Aldone al la organo Monata Cirkulero, kiun ni sendos al la skribintaj aŭskultantoj, oni trovos informilon pri la venontaj restadoj de la bona volo, kiuj disvolviĝos fine de majo kaj komence de junio post la pentekostaj tagoj, kaj dum la somero tre verŝajne komence de julio kaj fine de aŭgusto. Estas bonvenaj ne nur gejunuloj, sed ankaŭ bonvoluloj el diversaj aĝoj, kaj estas laboro por fortikuloj same kiel por aliaj. Oni pjoĉas en keloj por konstrui novajn kunvenejojn, en ĝardenoj por pretigi parkejojn por la aŭtomobiloj kaj ludejojn por la infanoj. Pli facila laboro estas la refarbado de la ŝutroj kaj kudro-laboro. Ni do esperas, ke ges-roj Torvid Edvardsen en Szczecin, Pollando, havos la okazon partopreni unu el tiuj ĉi restadoj de la bona volo, same kiel aliaj radio-aŭskultantoj.

A.- Ziŝino kaj Vilnur Jonasson en Stockholmo, Svedio, skribis al ni el Bulgario, kie ili partoprenis la 36-an IFEF-kongreson. El tiu fervojista renkontiĝo ili aŭskultis nin per sia kunprenita radio-ricevilo.

Cl.- Rudolf Porohaska en Vieno, Aŭstrio, forgesis doni sian kompletan adreson. Ni ne povas sendi al li specimenojn de la Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista kaj eble pro tio li ne ricevos la novan programon de nia Svisa Radio Internacia.

A.- F. W. Poppeck en Oberkirsch, Germanio okcidenta, ŝatis nian intervjuon kun s-ino Louise Marin el Parizo, Ĉar kiel ŝi, ankaŭ li praktikas esperanton kun siaj genepoj, same kun sukceso.

Cl.- En Germanio okcidenta ni salutu Josef Fischer en Nordwalde, Ludwig Röhl en Günzburg, kiu sendas utilajn aŭskult-raportojn, Dirk Kretschmann en Hamburgo, kiu ŝatas la jodladon, Günther Becker, kiu skribis el la 10-a Konferenco de Neŭtrala Esperanto-Movado. La saman poŝtkarton kun la bela monumento de Jesper Neergard, la skulptaĵo "La Espero", ankaŭ subskribis Ivo Lapenna.

A.- Ĉiam en Germanio okcidenta ni salutu Hans Georg Strauss en Leverkusen, Norbert Merkens en Wuppertal. Lia vorto estas citinda:

Cl.- "Ĵus reveninte de la 9-taga restado de Bidgoŝĉ, en kiuj mi partoprenis kiel premiito de Radio Polonia la temaron "paco", mi kun speciala sentemo aŭskultis al via Esperanta elsendo kun la temo "el la Vivo de Zamenhof". Ĝuste tie en Bidgoŝĉ renkontiĝis ne la diversaj nacioj, sed homoj. Kaj tute prave la ideo de Esperanto kondukas al paco inter la homoj, kaj per tio espereble ankaŭ al paco inter la popoloj."

A.- Horst Vogt en Schwäb Hall, Germanio okcidenta, raportas pri sia aŭskulto de niaj elsendoj dediĉitaj al la religia sinteno de Edmond Privat.

Cl.- Pastro Bernhard Eichkorn en Messkirch, Germanio okcidenta, komencas tiel leteron, kiun li direktis al nia kolego d-ro Arthur Baur:

A.- Mi estas ofta aŭdanto de Svisa Radio Internacia. Kompreneble mi povus aŭdi multajn germanlingvajn elsendojn de multaj radiostacioj, sed mia ĝojo kompreni almenaŭ unu negermanan lingvon - la esperantan - instigas min aŭdi precipe viajn elsendojn. Inter la stacioj elsendantaj en esperanto mi preferas Svisan Radion Internacian unue ĉar la sendkvalito estas plejofte bona kaj ĉiam komprenebla, due ĉar via elsendo estas ripetata kaj pro tio sufiĉe ofta, trie ĉar dek minutoj estas ne tro longa por mia alia okupiteco, kvare ĉar mi tre interesiĝas pri svisaj kaj esperantologiaj temoj.

Cl.- En Germanio ni ankoraŭ salutu Georg Strauss en Leverkusen, kiun interesis nia raporto pri la linkoj. Li informiĝas pri la sano de la arbaroj. La venontan jaron en Pentekosto okazos stud-semajno, kiun gvidos Bernhard Eichkorn. Ĝi estos dediĉita al la esperanto-nomoj de la sovaĝaj plantoj. Dum tiu seminario, kiu disvolviĝos en La Chaux-de-Fonds, estos ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo, kaj kun fakuloj povos diskutiĝi la naturprotektaj problemoj. Ni tutcerte raportos per la radio pri tiu ĉi seminario, same kiel ni raportos pri aliaj aranĝoj.

A.- Sed ne nur germanoj aŭskultas nin. Alexander Thaler en Ebnat-Kappel, Svislando, ankaŭ interesiĝis pri nia prelego pri la reenkonduko de linkoj en Svislandon.

Cl.- Girolamo Lucchetta en Monastier, Italio skribis ne nur el Italio, sed ankaŭ el restado en Alĝerio.

A.- Erik Swärd en Malmö, Svedio, Andrzej Marszalkowski en Kartuzy, Pollando, Paride B. Marson en Latina, Italio, Bernard Ludru en Saint-Ghislain, Belgio, Hernani Resende en Lisbono, Portugalio ankaŭ estu salutataj. Kaj en la leterujo aliaj aŭskultantoj ankoraŭ atendas

responzon. Do baldaŭ ni ree babilos kun vi, karaj geaŭdantoj, helpe de la salutvortoj nemenciitaj, kies nombron eble kreskigos la alveno de novaj leteroj.

Cl.- Nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras: Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*